

Esperanto aktuell 264

39. Jahr (2020) №6 (264)



Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Frua Esperanto-klerigejo en Wernigerode / Harz. Osterode am Harz – bonaj kondiĉoj por 'hibrida' jarĉefkunveno de GEA kaj personaj renkontiĝoj. 8-a Esperantista Migrado Aŭtuna. Virtuala kongreso en Vieno. Intervjuo kun sinjorino Niessner. Retaj kunvenoj por ĉiuj. Vibrado en kvantuma fiziko. Haushaltsplan 2021. Esperanto en la interreto: Origu. PSI: Paska Seminario Internacia 2021 en Braunschweig. Kvartaga migrado en la Harc-montaro.

Deutscher Esperanto-Bund e.V.**Germana Esperanto-Asocio r.a.**

Amtsgericht Berlin VR 13651 B

www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)**Bankokonto** (por membrokotizoj kaj donacoj) /**Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge

und Spenden): HELADEF1ERB,

Sparkasse Odenwaldkreis,

DE 3250 8519 5200 4011 4571.

Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

Leitung: *Sibylle Bauer*

030 / 5106 2935, 0800 336 3636

Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de**Memboprizorgado / Mitgliederbetreuung**

DEB: 0800 - 3 36 36 36 – 21

DEJ: 0800 - 3 36 36 36 – 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estrarro GEA / Vorstand DEB**Netzpost** an / retmesaĝo al gea.se@esperanto.deJedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form firstname.lastname@esperanto.de.**Prezidanto / Vorsitzender****Ulrich Brandenburg**, Durchwahl: -5111gea.prezidanto@esperanto.de**Viceprezidanto / Stellv. Vorsitzender****Andreas Emmerich**, Durchwahl: -5112**Trezoristo / Kassenwart****D-ro Matthias Hecking**, Durchwahl: -5113**Sekretario / Schriftführer****Nils Brinkmann**, Durchwahl -5125**Landaj ligoj / Landesverbände****Wolfgang Bohr**, Durchwahl: -5114**Administrado / Verwaltung****Barbara Brandenburg****Publika agado kaj pliklerigado /****Öffentlichkeitsarbeit und Weiterbildung****Oliver Walz**, Durchwahl: -5116**Kongresoj kaj renkontiĝoj /****Kongresse und Treffen****Andreas Diemel**, Durchwahl: -5120**Informteknologioj/Informationstechnologie****Franz Kruse**, Durchwahl: -5119**Jugendvertreterin / GEJ-komisiito****Michaela Stegmaier**, Durchwahl: -5118**Germana Esperanto-Junularo /****Deutsche Esperanto-Jugend****Michaela Stegmaier**, Durchwahl: -5211gej.prezidanto@esperanto.de**Komisiitoj / Beauftragte**esperanto.de/deb/beauftragte**Gazetaraj kaj publikaj aferoj****/Presse und Öffentlichkeitsarbeit****Louis von Wunsch-Rolshoven,**

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112

louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de**Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter für virtuelle Treffen Heinz-Wilhelm Sprick,**gea.zoom@esperanto.de, tel. 0800-3363636-5128**Komisiito por rondvojaĝoj/ Rundreisen,**

Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de**Erasmus+**

Marianne Maurer, Durchwahl: -5126

marianne.maurer@esperanto.de**Informmaterialo/Informationsmaterial****Goar Engeländer**, Durchwahl: -5127goar.engelaender@esperanto.de**Medienecho****Hermann Kroppenberg**, Durchwahl: -5121medienecho@esperanto.de**Libroservo / Bücherdienst****D-ro / Dr. Wolfgang Schwanzer**,Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, Durchwahl: -5122, buchversand@esperanto.de, www.esperanto.de/buchversand**Komisiito Interreta Redaktado /****Beauftragter Internetredaktion****Thomas Bormann**, Durchwahl: -5117thomas.bormann@esperanto.de**Pliaj adresoj / Weitere Adressen****Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /****Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)**

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,

030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412

www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)**Interkultura Centro Herzberg (ICH) /****Bildungszentrum des D.E.B.****Komisiitoj/Beauftragte: Zsófia Kóródy**(instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo),

Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die

Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363,

Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax),

ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich**Germana Esperanto-Instituto /****Deutsches Esperanto-Institut**Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für

Romanische Sprachwissenschaft,

Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel),

-432 (Fax), martin.haase@esperanto.de,www.esperanto.de/dei**Germana Esperanto-Biblioteko /****Deutsche Esperanto-Bibliothek**p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432

Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)

biblioteko@esperanto-aalen.debibliothek-aalen@esperanto.dewww.esperanto.de/bibliothek**Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung****Andreas Emmerich**, estraro@fame-stiftung.de

(nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,

Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG,

BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /**Österreichischer Esperanto-Verband**aef@esperanto.at, www.esperanto.at**Aŭstria Esperanto-Junularo /****Österreichische Esperanto-Jugend**

Weissgerberlände 30-36/5/11, 1030 Wien,

aej@esperanto.at, <http://aej.esperanto.at>**Esperantomuzeo Vieno /****Esperantomuseum Wien**

Palais Mollard, Herengasse 9, 1010 Wien,

+43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25,

1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm**UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA****Germanio / Deutschland**D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst**Aŭstrio / Österreich****Leopold Patek**, Martinstr. 104/38,

3400 Klosterneuburg, Pošteln. +43/66473611289,

aon.913548977@aon.at**Esperanto aktuell**

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,

der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:**Stano Marček** (Martin/Slovakio),**Yashovardhan Singh**, Im Johannistal 23, 42119 Wuppertal. Durchwahl: -54**Kunlaborantoj / feste Beiträger:****Hermann Kroppenberg** (Medienecho),**Utho Maier** (Bibliotheken), Peter Zilvar (ICH)**Presejo / Druck**

Alfaprint, Martin, Slovakia

Esperanto aktuell kun -kune- havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo (vidu maldekstre supre) por 19 €

(de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuell mit -kune- erscheint

sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der

Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 €

(Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche

Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de**Kontribuoj / Beiträge**Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2021/1 ĝis la 15-a de januaro 2021. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format *.doc o.ä.) al ea@esperanto.de,

für Nr. 2021/1 bis zum 15. Januar 2021.

Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann an Yashovardhan (s.o.).



Karaj legantoj,

pandemio havas multajn viktimojn: la personojn, kiuj infektiĝas kaj eble mortas pro ĝi, la ekonomion - pli konkrete: turismajn entreprenojn, flugliniojn, hotelojn, restoraciojn -, kulturon kaj sporton, sed ankaŭ la Esperanto-movadon. Ties ĉefaj celo ja estas faciligi internaciajn kontaktojn kaj kunigi homojn uzantajn nian lingvon. Dum la lasta duonjaro la movado baraktas por vivteni iun formon de komunikado. Kelkaj el ili pli, aliaj malpli sukcese adaptiĝis al la nova realeco kaj virtualigis sian laboron. Okazis MondaFest*, virtuala UK, virtuala KAES, kaj daŭre okazas retaj kunvenoj de niaj grupoj, ofte eĉ kun ekzotikaj partoprenantoj. Tamen: kun kiu ajan mi parolis lastatempe, mi rimarkis laciĝon pro tiu fortostreco - kaj la esperon baldau denove renkontiĝi normale. Dum la paŭzo inter du virusaj ondoj ni fakte sukcesis restarigi iom da normaleco. Pri ĝi mi volas raporti.

Fine de oktobro malgraŭ ĉiuj obstakloj GEA sukcesis kunvenigi sian Asocien Konsilantaron (Verbandsrat) kaj en ties kadro okazigi la ĉirajan Federacian Asembleon (Bundesversammlung), nian jarĉefkunvenon. Partoprenis kvardeko da personoj. La salono en Osterode apud Herzberg estis sufiĉe granda por gardi distancon, kaj la mia scio neniu infektiĝis tie. Krome ni unuafoje užis modernan teknikon por ebligi al GEA-membroj retan partoprenon en la Federacia Asembleo. Tiun eblecon užis ĉ. 20 virtualaj partoprenantoj. Felice ĉiuj necesis nur unu novelekti: Reinhard Pflüger post du mandatoj ne plu rajtis reelektiĝi kiel kaskontrolisto. Lin nun anstataŭas Stefan Krieghoff. Malgraŭ la nekutimaj cirkonstancoj ni sukcesis organizi preskaŭ rutinan jarĉefkunvenon: la germanlingvan protokolon vi trovos alioke en ĉi tiu eldono. Grandan dankon al Zsófia kaj Peter el Herzberg, kiuj ebligis tiun rekontojn,

kaj al Heinz Sprick el Hameln: li sukcese prizorgis la "virtualigon". Por noti en la kalendaro: la venontjara kunveno de la Asocia Konsilantaro estas antaŭvidita por la semajnfino 29.-31.10.2021 denove en Herzberg.

Alia signo de normaleco okazis ĵus antaŭ la kunveno en Osterode. Ni sukcesis revivigi la tradicion (ĝis 2016) de Esperanto-Migradoj Aŭtunaj per la nun 8-a EMA en kaj ĉirkaŭ Hitzacker (Elbe). La kvintagan migradon tra la regiono Wendland partoprenis 15 migremuloj, bona nombro por tia evento. Inter ili troviĝis ankaŭ kelkaj eksterlandanoj, sed ĉiuj loĝantaj en Germanio. Partoprenantoj eĉ el najbaraj landoj devintus antaŭe enfermiĝi en kvaranteno kaj do ne povis veni. Ni tamen ne krokodilis, kaj la etoso (plej ofte ankaŭ la vetero) estis bona. Ĉiuj ĝuis la eblecon konatiĝi kun bela regiono, iom movi sin en freŝa aero kaj revidi geamikojn. Ĉion perfekte organizis Gerald Roemer, kaj li faros tion ankaŭ venontan jaron. La 9-a EMA okazos inter la 17-a kaj 22-a de oktobro 2021 en kaj ĉirkaŭ Neustadt (Weinstraße).

Mi skribas ĉi tiun leteron meze de novembro. La viruso revenis, kaj nur kelkajn tagojn post la mencitaj du eventoj denove ekvalidis la konataj limigoj de kunvenoj, tranoktado ktp.. En la nuna momento estas tute malklare, ĉu niajarfina renkontiĝo Luminesk' povos okazi. Ĉar necesas antaŭmendi la ejon (kaj ni devos punpagi por malmendoj), la estraro devas fari malfacilajn decidojn. Montriĝas ke la kutimaj reguloj ne adekvatas por situacio, kiu ŝanĝigas ĉiusemajne kaj malebligas ian ajn planadon.

Multaj aliaj asocioj alfrontas similajn problemojn. Sed jen almenaŭ unu bona novajo: GEA ricevas subvencion de „Stiftung Engagement und Ehrenamt“ el la programo por subteni volontulajn organizojn plej suferantajn pro la sekvoj de la koronavirusaj limigoj. La mono estas destinita por aĉeto de profesieca ekipaĵo por virtualaj kaj hibridaj kunvenoj. GEA krome aĉetis propran "Zoom"-abonon, kiu estas je dispono ankaŭ por niaj ligoj, fakaj asocioj kaj grupoj (detalojn priskribos Franz Kruse alioke en ĉi tiu eldono). Administros ĝin (kaj se necese konsilos) Heinz Sprick kiel nova komisiito. Almenaŭ do ni estos pli bone ol ĝis nun preparitaj por la kazo, ke la anomalioj fariĝos normala.

Restu sanaj! Belajn kristnaskotagojn kaj feliĉan novan jaron deziras al vi

Ulrich Brandenburg
Prezidanto de GEA

Enhavtabelo/Inhalt

1: Frua Esperanto-klerigejo en Wernigerode / Harz "elfosita" (legu sur la p. 5).

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio:
Karaj legantoj. Enhavo.

4-5: Interkultura Centro Herzberg:
Osterode am Harz – bonaj kondiĉoj por 'hibrida' jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio kaj personaj renkontiĝoj. Aranĝo dum la aventura jaro.

6: 8-a Esperantista Migrado Aŭtuna.

7-9: Aŭstria Esperanto-Federacio:
Clemens Setz kaj "Die Bienen und das Unsichtbare". Intervjuo kun policaj specialistoj. Virtuala kongreso en Vieno. Intervjuo kun sinjorino Niessner.

10-12: Germana Esperanto-Asocio:
Deutsche Stiftung für Engagement und Ehrenamt. Retaj kunvenoj por ĉiuj. Nachweis der Spende / Zuwendungsbescheinigung.

13: El la landaj kaj fakaj ligoj:
Vibrado en kvantuma fiziko. Invito al blindultauga hotelo.

14: Esperanto en la interreto:
Origu.Werde gulden – Origu.

15: Novaperinta libro: Ein Buchtipp für die Quarantäne-Zeit. Ĉu vi ŝatus partopreni en Rondo por tradukadi?

16-18: Medienecho

19-20: Paska Seminario Internacia:
PSI 2021 en Braunschweig kaj la korona viruso.

21: El la landaj kaj fakaj asocioj:
Viktor Falkenhahn und die Gründung der Fachgruppe Interlinguistik/ Esperantologie vor 50 Jahren.

23-25: El biblioteko kaj arkivoj:
Folge 57, Neuerscheinung von Clemens Setz: „Die Bienen und das Unsichtbare“. Zugabe: Alex Bellos Sprach-Puzzlebuch.

27-30: •kune• – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Nova GEJ-retpaĝo. Recepto por baki verdan bulkostelon. DEJ Online-Seminar Teil 7. Kvartaga migrado en la Harc-montaro. Haushaltsplan 2021.

31: Nekrologoj / Konkurso: Elke Kern-Kühnel verstorben. Klaus-Peter Fritz. Konkurso pri mallongaj filmoj "Komunikadmasko 2020".

32: 8-a Esperantista Migrado Aŭtuna.

Osterode am Harz - bonaj kondiĉoj por 'hibrida' jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio kaj personaj renkontiĝoj

La jaro 2020 pro la granda pandemio bedaŭrinde ja malebligis la normalritman jarĉefkunvenon de GEA dum la kutima tradicia pentekosttempa kongreso.

Sekve la estraro de GEA devis serĉi alternativan solvon por okazigi la devigan ĉiujaran jarĉefkunvenon de la membraro de Germana Esperanto-Asocio.

Laŭ la invito de la urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz oni ja planis por la jarĉefkunveno kaj por la renkontiĝo de la landaj ligoj de GEA ktp. uzi la Kavaliran Salonon de la Welf-kastelo en Herzberg. Pro la pandemio tamen ne eblis ricevi ĝin por tiu celo, do la Esperanto-Centro en Herzberg provis serĉi alternativan solvon.

En la najbara urbo Osterode am Harz, nur dek kilometrojn for de Herzberg, estis trovita taŭga ejo. Temis pri la restoracio "Freiheiter Hof", nur kelkajn minutojn for de la urbocentro de Osterode am Harz.

La domo disponas pri granda salono, sekve la kunsidantoj povis havi la bezonatan sekurecdistancon kaj – la unuan fojon en la historio de GEA – ankaŭ la ne ĉeestantaj membroj povis per interreto sekvi la diskutadon kaj engaĝi sin virtuale.

La pli malgrandaj salonoj servis kiel babilejoj kaj manĝejoj, ja bonŝance en la sama konstruaĵo funkciis ankaŭ restoracio, kiu ebligis havi komunajn manĝaĵojn sub la sama tegmento. Post longa tempo denove povis ĉiuj ĝui la senperan komunikadon per la komuna lingvo.

Por la partoprenantoj Zsofia Korody kaj Peter Zilvar ofertis urbgvidadojn, sabate en Osterode am Harz, kaj dimanĉe en Herzberg. Multaj miris pri la beleco de la faktraburbo Osterode am Harz. La impona foireja preĝejo, la historia urbodomo, la urbomuro, la granda foireja placo ktp. postlasis agrablajn memorojn.

La evento ricevis bonan gazetaran efon. Ĝojige, ke la regiona gazeto *Harzkurier* publikigis gazetartikolon antaŭ la jarĉefkunveno kaj post la aranĝo denove, ĉe kun grandega foto kun la delegitaro en la granda salono de la restoracio "Freiheiter Hof".

(La foton pri la jarĉefkunveno faris Zsófia Kóródy)



Frua Esperanto-klerigejo en Wernigerode / Harz "elfosita"

Pro la pandemio Esperanto-Centro Herzberg en kunligo kun Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj ĉi-jare nur povis hibridforme organizi la jam tradician klerigseminarion TORPEDO en oktobro.

Inter aliaj dr-ino Anina Stecay, Zsofia Korody, Martin Ptasinski kaj Petro Zilvar ofertis diversajn fakprelegojn. Dimanĉe ni entreprenis ekskurson al la bela nordharca urbo Wernigerode. La historia faktraburbo estas turisma magneto pro la belega kastelo, la pompa urbodomo, la fama etspura trajno ktp.

Sed el Esperanta vidpunkto nin atendis speciaala frandaĵo. Versajne multaj ne plu scias pri tio. Jam antaŭ la Universala Kongreso en Dresdeno (1908) ekzistis en Wernigerode en Bismarckstrato 24 la granda "Vilao Esperanto". Ĝi servis kiel frua klerigejo kaj feriodomo por germanaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Supozeble temis pri unu el la plej fruaj Esperanto-Centroj kaj klerigejoj. Krome la Esperanto-

grupo Wernigerode renkontiĝis en la domo. Antaŭ la domo estas ĝardeno kaj malantaŭ la domo granda herbejo, certe ĝi funkcias kiel bela ripozejo por la fruaj esperantistoj. Momente en la domo ne plu loĝas homoj, tamen la nuna aspekto ankoraŭ belas kaj tre similas al la frua stato je komenco de la lasta jarcento. La varbtabulo "Vilao Esperanto" ne plu troviĝas supre de la enirejo. Ni provos esplori iom pri la fruepokaj Esperanto-aktivcoj en Wernigerode kaj tiam ni denove informos pri nia frua Esperanto-klerigejo.

La nunan dratbarajon antaŭ la domo iu farbis en lumanta verda koloro, ĉu memorcele?

Ĉiu kaze ni faris memorfotojn. Se vi foje venos al la bela urbo Wernigerode, nepre serĉu tiun ĉi historian lokon.

En la reto oni trovas historian bildkarton "Vilao Esperanto". Ĝi troviĝas en la Esperanto-muzeo de Svitavy, en Ĉeĥio: www.ipernity.com/doc/esperanto-muzeo-svitavy/9920003



Aranĝoj dum la venonta jaro / Veranstaltungen im kommenden Jahr

Anfang März 2021: Neue Sonderausstellung „Firmen- & Produktnamen in Esperanto, Museum“

05.03.21 – 07.03.21 Multfaka klerigseminario far GEA-Filio por Klerigado & Kulturo, Herzberg

19.03.21 – 21.03.21 Esperanto-Wochenendsprachkurse im ICH (Esperanto-Centro Herzberg)

07.05.21 – 09.05.21 Multfaka GEA-Klerigseminario far GEA-Filio por Klerigado & Kulturo, Herzberg

Juli 2021 Zweiwöchige Esperanto-Sommersprachkurse im ICH in Herzberg

Se estas demandajo, bv. kontakti nin!

Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz-la Esperanto-urbo

Tel. 05521-5983

E-mail: esperanto-zentrum@web.de

stato: 13.11.2020

8-a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA)

Migradoj tra la regiono Wendland, de la 18-a ĝis la 23-a de oktobro 2020.

Cu vi sciis, ke kastora familio okupas teronon de ĉirkau unu kvadrata kilometro (=1 miliono da kvadrataj metroj), sur kiu ĝi konstruas du ĝis kvar loĝburgojn? Ĉi tiujn kaj multajn aliajn sciindajojn klarigis al ni biologo, kiu lunde gvidis nin tra la urbeto Hitzacker kaj al la rivero Elbo.

Sed mi preferas rakontu sinsekve. Dimanĉe ni, entute 15 personoj el diversaj regionoj de Germanio, alvenis en la junulargastejon de la urbeto Hitzacker. Kelkaj alvenis per siaj aŭtoj kaj unue veturis al la stacidometo, por akcepti la trajnvojaĝintojn. La unua kulmino estis komuna tagmanĝo en la restoracio "Inselküche" en la malnova urboparto.

En la junulargastejo ni vivis unu- aŭ duope en po unu ĉambro kaj en la manĝeo ni surhavis maskojn kaj gantojn. Ĉar krom nia grupo preskaŭ neniu tie loĝis, ĉio funkciis tute frankvile kaj sen problemoj. Ĉiumatene ĉiu el ni preparis sian lunĉopakajeton por la tuttagaj ekskursoj.

Lunde je la 9-a horo la jam mencita biologo atendis nin antaŭ la domo kaj gvidis nin tra la arbaro al la urbeto Hitzacker, kie ekzistas multaj ĉarmaj domoj kaj dometoj en malnovurbo sur insulo, kaj eĉ surmonte malgrandega vitejo. Li montris kaj klarigis al ni fungojn kaj birdojn kaj ankaŭ pri la rivero Elbe, kaj pri la ŝiptransportoj sur ĝi li multajn interesajojn rakontis. Ĉiu el ni kunhavis dorsosakon kun trinkajo kaj lunĉpakajo kaj ni piknikis rekte ĉe la riverbordo.

Marde post la matenmanĝo ni ekmarŝis tra arbaro okcidenten. Estis sufiĉe longa maršo kaj kun ĝojo ni ripozis kaj piknikis en vilago sur herbejo apud la preĝejo. Refreŝiĝinte ni plumarŝis kaj atingis la bienon "Michaelshof Sammatz", kie freŝa kafo kaj diversaj specoj da bongusta kuko atendis nin. Poste sinjoro gvidis nin tra la bieno, kiu estas granda kaj eksterordinara. Al ĝi apartenas sep ĝardenoj, arbara lago, bestejoj kaj eĉ infanhejmo. Infanoj kaj junuloj, kiuj ne plu povas vivi en la familio, tie

trovas novan hejmon. Interesa estis por mi, ke multaj edukistoj partatempe laboras kun la infanoj kaj gejunuloj kaj partatempe kiel ĝardenistoj, por malstreĉigi. Helpantoj el diversaj landoj, eĉ el Latin-Ameriko, tie sensalajre kunlaboras, ricevante nur loĝeblon kaj mangaĵojn. Nia gvidanto mencias, ke antaŭ monatoj tie vivis hungarino, flue parolanta Esperanton. Plua specialaĵo estas, ke tie vivas ankaŭ bestoj de forpereantaj rasoj. Ĉitate ni per mendita aŭbuseto reveturis al la junulargastejo.

Merkrede ni per aŭtoj veturnis al monto en ebenajo apud la rivero Elbo, sur kiu troviĝas elrigardo-turo kaj la ĉarma kafejo "Schwedenchanze". La mastrino kun sia nepino gvidis nin tra la arbaro kaj montris kaj klarigis la historion de iamaj setlistoj. Ni pluveturis al Gartow, kie ni iom promenis tra la pitoreska urbeto al la kastelo, kaj poste al la salominejo Gorleben. Multaj tabuloj tie informas pri la planita deponejo por radioaktivaj rubaĵoj kaj la protestoj kontraŭ tio.

Ankaŭ jaude ni per aŭtoj ekskursis kaj okcidente de Lüchow vizitis rondformajn vilagojn (germane: *Rundlingsdorf*), inter alie Lübeln. Tie ekzistas vidinda muzeo (www.rundlingsmuseum.de), sur kies tereno staras tre diversaj domoj el la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Speciale interesa laŭ mia vidpunkto estis la penegaj laboroj de la semado de lino ĝis preta tolaĵo en ŝranko. Kiel kutime ni piknikis, ĉifoje sur benko sub grandega arbo. Postagmeze ni migris tra Gühлиз, Meuchefitz, Seerau kaj Jabel ĝis Satemin. Antaŭ la kafejo "Markthof Satemin" ni komforte sidis sur vasta ronda vilagplaco, ĝuante bongustajn kukojn kaj kafopreparaĵojn.

Ĉiuvespere, post komuna verspermanĝo, ni kunvenis je la 20-a horo en sufiĉe granda salono, por aŭskulti diversajn prelegojn. Lunde Inge Bartling vocelegis por ni la amuzan epopeon "De Häuhnersupp" de Rudolf Tarnow en la platdiĉa (malaltgermania) lingvo. Ĉar temas pri rakonto el la tempo de Napoleon, necesis aldoni kelkajn klarigojn. Ulrich Brandenburg raportis pri la aktuala situacio en Ukrainio kaj Horst Gruner pri sia laboro kiel ambasadoro en Sieraleono. Ambaŭ ilustris siajn prelegojn per fotoj. Mi prezentiĝis fotojn pri Schwerin sub la titolo "Schwerin - urbo kun 7 lagoj". Ĉi tiun prelegeton ni klubanoj en Schwerin antaŭnelonge komune pretigis por en- kaj eksterlande prezenti nian belan urbon (i.a. septembre en la Esperanto-Klubo de Rejkjaviko). Ĵaude ni kunsidis sen prelego, kolektante ideojn por estontaj EMA-j.

Vendrede, post nia lasta komuna matenmanĝo, ni gaje-malgaje reciproke adiaŭis. Laŭ mia scio ĉiu ĝi duoble ĝuis ĉi tiujn tagojn kaj migradojn en la regiono Wendland. Unuflanke, ĉar ĉio estis

perfekte organizita. Survoje ni perdis nek aŭton nek personon kaj neniam niaj gvidantoj devis admoni, ke la tempo premas. Aliflanke ni des pli ĝuis ĉi tiujn tagojn en amikeca rondo, ĉar pro la konataj koronvirusaj problemoj diversaj aliaj aktivecoj ne povis okazi. Tutkore ni dankas al Gerald Roemer, Mariko Aoshima, kaj ĉiu aliaj, kiujn preparis kaj efektivigis ĉi tiun bonegan rekontoĝon.

André Christian Weber
[Esperanto-klubo Schwerin]

La 9-a EMA okazos en Neustadt / Weinstraße de la 17-a ĝis 22-a de oktobro 2021. Informoj en la sekvonta *Esperanto aktuell* kaj en la interreta paĝo www.esperanto.de/de/ema



Clemens Setz kaj “Die Bienen und das Unsichtbare”

Taglibro por la 27-a de oktobro 2020:
epokfara apero de Esperanto en la aŭstra
radio/televido!

Jen la teknika sinsekvo de tre signifa tago por ni, aŭstraj esperantistoj, sed ankaŭ ĉiu niaj najbaraj verduloj samlingvaj. Ĝi okazis preskaŭ precize unu jaron post la internacie ege grava simpozio okaze de la 90-jariĝo de la Esperantomuzeo, kolekto de planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

07:54

La prezidanto de AEF, Alfred Heiligenbrunner, raportas al la estraro de AEF: *Zu dem Buch „Die Bienen und das Unsichtbare“ von C. Setz gab es heute eine Buchrezension im Radio Ö1 Morgenjournal um 7:26.*

12:20

La sama, plusendante mesaĝon de Christian Cimpa de la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko je la 10:24, kiu skribas: Lieber Alfred, heute sollte in der ZIB1 ein Beitrag kommen: Interview mit Clemens J. Setz im Esperantomuseum!

19:59

La taglibra aŭtoro, Hans Michael Maitzen, entuziasme sendas raporteton sub la titolo „Sukcesego!“ al la estraro de AEF, jentekste: Dankon por la sciigo pri Setz en ZIB1, jus elsendita. (ZIB1 staras por „Zeit im Bild 1“, la ĉefa vespera informelsendo de la aŭstra televida kanalo ORF1 ekde la horo 19:30.) Brila sukceso! Gratulon! Esperanto evidente daŭre vivas. Imagu, la paroldamo de ORF, Susanne Höggerl, finante tiun parton, eĉ plukondukis la TV-publikon (kutime miliono da spektantoj) per Esperantlingva „tenisa ludo“ al la samtempa turniro en Vieno. Ni, verduloj, indulgas al ŝi, ke laŭ la reguloj de la germana lingvo ŝi prononcis „teniza“!

20:28

Estrarano de AEF Leopold Patek mesaĝas al la retgrupo de aŭstraj esperantistoj: Intervjuo kun la aŭtoro Clemens J. Setz, kiu skribis libron pri abeloj kaj planlingvoj. TVTHEK. ORF.AT:

Clemens Johann Setz (naskiĝis la 15-an de novembro 1982 en Graz) estas aŭstra verkisto kaj tradukisto. Li dum ses jaroj laboris pri la projekto, en kiu li pristudis planlingvojn, kaj kiu rezultis en la libro *La abeloj kaj la mondo ne videbla*, en kiu li prilumas diversajn planlingvojn el literatura perspektivo. Legu pli ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/Clemens_J._Setz.



Clemens Setz schreibt Buch über Kunstsprachen – ZIB 1 vom 27.10.2020 um 19:30. Uhr Esperanto, Volapük, Klingonisch, Blissymbolics und Talossa: Mit diesen Begriffen werden sogenannte Kunst- und Plansprachen bezeichnet. Schriftsteller Clemens Setz hat sich in seinem neuen Buch "Die Bienen und das Unsichtbare" auf die Spurensuche von Kunstsprachen begeben. (Sekvas la ligilo). – Amike, Leo

Clemens J. Setz naskiĝis en 1982, samurbe kiel mi Grazano. Li estas reprezentanto de la junaj generacioj de verkistoj, do intime ligita al la reta mondo, kaj esploruma alternativulo (barbegulo i.a.). Lothar Müller priskribas en *Süddeutsche Zeitung* de la 14.11.2020 la aŭtobiografian karakteron de lia romano, kiu estas ankaŭ iusence faka libro. Ekz. en la ĉapitro „Mein Sommer im Volapük“ li priskribas taglibre paralelece al ties aŭtoro Johann Martin Schleyer la kundependon de vivokrizo kaj planlingva obsesio. Lin fascinas ne tiom la gramatiko de Volapuko, kiom ĝia vorttrezoro. Li suferas je la aŭtoimunmalsano de lingva virtuozo. Volapuko estas lia kontraŭdepresia medikamento. Li ne facile lernas en printempo kaj somero de la jaro 2015, sed plaĉas al li, ke „lol“ staras por „rozo“ kaj la semajntagoj nomiĝas: „mudel tudel vedel dödel fridel zädel sudel“ (do lundo – al dimanĉo). Tio memorigas min pri sperto, lernante Esperanton, kaj ties rilaton al aliaj planlingvoj. Ekzemplon mi ricevis per ekscio de la traduko de la fama poemo/kanto „Sah ein Knab ein Röslein stehn, Röslein auf der Heide“ en Esperanto: „Knab' rozeton vidis li, rozeton sur herbejo“ kaj en Volapük: „Ölogom pu lolili, lolili su luluf“. Ne malfacile estis por mi, tiam studento kadre de la Studenta Esperanto-Klubo Graz kompreni, ke la unua Esperantoklubo estiĝis en Germanio en Nürnberg el antaŭa Volapuka klubo. Fine endas mencii, ke ankaŭ la TV-kanalo 3sat dediĉis 5 minuton eron de sia programo „Kulturzeit“ je la 6-a de novembro al la nova libro de Clemens J. Setz, dum kiu la aŭtoro persone intervjuigis.

Hans Michael Maitzen, 14.11.2020



Intervjuo kun policaj specialistoj

La 2-an de novembro 2020 okazis en Vieno terorista atako. Je la 20:00 al polico venis alvokoj, ke homoj estas vunditaj kaj kelkaj mortigitaj per pafiloj.

Oni parolis pri pluraj lokoj, eble pri pluraj atakantoj. Du surstrataj policistoj, kiuj hazarde patroliis, persekutis la atakanton. Unu el ili estis severe vundita de la atakanto, kiu uzis rapid-pafilon Kalašnikov. Nur poste evidentigis, ke estis nur unusola atakanto. Kaj ke tio, kio aspektis kiel eksplodaj-zono sur lia korpo, estis nur postiĉo.

Du policaj specialistoj, kiuj tiutempe dejoris kaj estis tuj surloke, finfine sukcesis haltigi la atakon. Jen la intervjuo kun ili. Pro sekurecraj kialoj nek iliaj vizaĝoj, nek iliaj nomoj estas publicitaj. Oni nur scias, ke la pli maljuna kaj finfina pafanto havas ĉirkaŭ 40 jarojn kaj ekde 17 jaroj dejoras en tia teamo. La pli junu havas inter 30 kaj 40 jarojn kaj 5 jarojn dejoras tie.

La atako finiĝis je la 20:09 per la morto de la atakanto.

Kiel vi travivis la dramatecajn horojn? Kie vi troviĝis, kiam venis la help-demanda alvoko?

Policisto 1: (la pli maljuna) Ni ambaŭ dejoris. Mi jus estis en la armila ĉambro, kiam venis la alarmo. Ene de 30 sekundoj mi estis preta por starti. Tion ni ekzercas sub tempopremo.

Policisto 2: (la pli junu) Mi jus estis kun kolegoj en patrolo sur ponto Reichsbrücke. Daŭre kvar patroloj el ni estas survoje en Vieno. Tiel preskaŭ ĉiuj loko estas atingebla ene de 5 minutoj. La rapideco estas nia forto. Tiam jam venis la drameca raporto pri la pafil-vundita kolego. Laŭ la sono kaj la kod-vortoj la drameco tuj estis klara. La kolegoj transdonis al ni la movad-profilon de la atakanto. Tial ni povis alveturi punktekzakte. Necesas mencii, ke la vera heroo estas la alpafita patrolpolicisto. La instrukcioj por tia situacio rekomendas, altiri atenton al si, okupi la atakanton kaj ĝeni lian koncepton. Sed tio estas la teorio. Kiel patrolpolicisto kontraŭ persono kun Kalašnikov-pafilo - tio bezonas multe da kurago.

Policisto 1: Tio estis la plej dangera tasko entute. Se la plej unua patrolo ne estus jam konstruinta tiom da premo, la afero estus fininta multe pli malbone. Tiam ĉiu sekundo valoras. Oni sentas enorman tempopremenon kaj montriĝas la valoro de nia edukado. Ĉio kuras aŭtomate kaj funkciis.

Ĉu vi rekte venis al Schwedenplatz?

Policisto 1: Ekzakte. La malmultaj sekundoj en la aŭtomobilo mi eluzis por kviet-spirigi min per ventro-spirado. Tio gravas. Ekde elaŭtiĝo tuj klare montriĝis, kio okazadas.

Policisto 2: Pafoj, krioj. Dummomente oni estas plena de adrenalino kaj plene en la realeco. Ni persekutis la atakanton perpiede. En aŭtomobilo la persekuto estus tro maladaptigebla kaj pli endanĝerigita en kazoj de alpafado.

Kiel vi sentis la situacion ĉe Ruprechtsstiege?

Policisto 2: Ĥaosa kaj nesuperrigardebla. Ni estis alpafataj.

Policisto 1: Estis ne tiel, ke tie estus estinta nur la atakanto kaj ni. Homoj kuris tien kaj reen kriante kaj montris en ĉiuj ajn direktojn. Inter tiuj troviĝis policaj oficistoj en civilaj vestoj (sen uniformo). Tio estas ege postulema kaj eksterordinara ankaŭ por ni. Necesas fulmrapide eltovi: Kion planas la atakanto? Ĉu eble li volas kapitulaci? Ĉu li entute estas la ĝusta? Ja ne eblas simple pafadi.

Kiu finfine pafis?

Policisto 1: (levas la manon) Mi.

Ĉu estis la celo, trafi lin mortige?

Policisto 1: Mortigo neniam estas la intenco. Celo estas, igi la atakanton ne-agad-ebla. Estus estinta ankaŭ la eblo, ke ni ambaŭ estus pafintaj. En tia situacio ĉio devas okazi fulmrapide.

Kiel vi perceptis la atakanton?

Policisto 1: Nervoza, ĥaosa, nekalkulebla.

Kio okazis post la pafoj?

Policisto 1: Mi radiofonis "atakanto trafita kaj surterigita". Tiam mi rimarkis, ke mi pli rapide parolas ol kutime.

Policisto 2: La situacio ankoraŭ ne estis sendanĝerigita. Ja eblis, ke estas pluraj atakantoj, aŭ ke en iu dom-enirejo iu premas butonon kaj ĉio eksplodas. Cetere estis daŭrigataj radiofoniaj raportoj pri pliaj pafoj, suspektinduloj sur dom-egmentoj aŭ ostag-preno. Estis ekstrema nesuperrigardeblo.

Kiam finiĝis via dejoro?

Policisto 1: Estis la horo 2:30, kiam ni revenis al la kazerno.

Kiel reagis viaj kolegoj?

Policisto 1: Neniu aplaŭdas. Oni parolas pri detaloj, por ke aliaj povas lerni. Sed ne estas kialo por festi. Nia ĉefo rakontis, ke ni ricevis gratulojn de specialistaj policistoj el la tutu mondo, ĉar ni estis tiom rapidaj.

(laŭ *Kronen Zeitung* de 2020-11-15, artikolo de Edda Graf en Krone Bunt. Esperantigis Alfred Heiligenrunner)

De la 18-a ĝis la 20-a de novembro 2020 okazis en Vieno virtuala kongreso kun la titolo:

Universalsprachen, Kunstsprachen, Plansprachen: Träume und Utopien von einer Welt ohne Übersetzung

La aranĝon subtenis:

1. Fonds zur Förderung der Wissenschaftsforschung (FWF); 2. Internationales Forschungszentrum Kulturwissenschaften (IFK) an der Kunstudiversität Linz; 3. Institut Wiener Kreis an der Universität Wien.

La programo estas rigardebla ĉe la retaĝo: https://wienerkreis.univie.ac.at/fileadmin/user_upload/p_wiener_kreis/Plakate_Veranstaltungen/20_11_18.-20._Programm_Schedule_Universalsprachen_Virtuell-DE_EN.pdf

Intervjuo kun sinjorino Niessner

S-ino Niessner estis maljuna virino kaj multjara esperantistino. La intervjuon kun ŝi gvidis Franziska Dodik en la jaro 2019.

Nia kara sinjorino kaj samideanino Herta Niessner naskiĝis en 1921 kaj venontjare ŝi atingus cent jarojn. Dum preparo de tiu ĉi artikolo atingis nin la informo, ke s-ino Niessner forpasis la 11-an de novembro 2020, en la aĝo de 99 jaroj.

Kara sinjorino Niessner, diru, kiel kaj kiam vi esperantistiĝis?

Mi ne scias tion tiel ĝuste. Pri ekzisto de Esperanto mi eksciis jam kiel lernantino, sed oni ofte diris: "Esperanto ne havas estontecon." Sed kiel mi al aliaj esperantistoj alvenis, mi ne plu memoras. Mi nur scias, ke sinjoro Vokal estis estro de Vienaj esperantistoj kaj la astronomo profesoro Maitzen estis estro por la tuta lando Aŭstrio. Mi regule iris al prelegoj kaj ankaŭ tumaniere lernis la lingvon. Mi faris ankaŭ du ekzamenojn. La trian ekzamenon mi ne faris, ĉar mi ne bezonis ĝin. Se oni faras tri ekzamenojn, oni rajtas postuli monon por instruado de la lingvo kaj mi jam havis mian salajron kiel instruistino. Mi ne bezonis monon. Se oni povas helpi iun aŭ fari plezuron, tiam mi povas fari ĝin tiel, sen pensado pri profito.

Mi ricevis unu libron de sinjoro Vokal por lerni Esperanton. En ĉi tiu libro staris: "Ĉiu lingvo rilatas al la gloro de la lando." Do, kiu havas la plej grandan prestiĝon en la landoj, kies lingvo validas? Nun ni scias, kial la angla estas la superreganta lingvo.

En kiuj internaciaj kongresoj vi partoprenis?

Mi estis en Göteborg en la jaro 2003, pri tiu kongreso mi bone memoras. En la jaro 1997 mi estis en Aŭstralio. Sed kiel nomiĝis tiu urbo, mi ne scias plu. Mi flugis al Aŭstralio nur, ĉar mi iris al unu dansa festo en Belvedere. Unu amikino invitis min tien. En la lasta momento ŝi alvokis min kaj diris, ke ŝi ne povas veni al la festo. Do, kion fari? Mi iris tute sola tien. Tie mi konatiĝis kun unu sinjorino, kiu ĝuste en Aŭstralio havis domon. Ŝi estis heredinta tiun domon. Sed ŝi unue volis vojaĝi al Parizo, ĉar en Parizo ŝi havis amikinon. Tiu sinjorino invitis min akompani ŝin al Parizo. Kompreneble mi akceptis la oferton kaj tiel mi alvenis al Parizo, al unu tre bela loĝejo kun



ses ĉambroj. La gastigantino de tiu ĉi loĝejo havis unu filinon, kiu ne ŝatis, ke ŝia patrino invititis gastojn el fremdaj landoj. Ŝi (la gastigantino) diris al mi: "Ma fille me deteste." "Mia filino malamas min." Mi devis scii, oni ofte invititas homojn pro gentileco, sed la invitita devus dankeme malakcepti la invititon. Sed kion fari? Mi estis scivolema vidi Parizon kaj mi volonte vojaĝis. Post Parizo mi flugis al Aŭstralio kaj estis ses tagoj en la ĉefurbo (de Suda Aŭstralio) Adelaide (Adelajdo).

Kiun kongreson vi aparte ŝatis?

En Göteborg estis vere bona etoso kaj bela kongreso. Unufoje ni havis kongreson en Melk [verŝajne intermixta kun Krems] ĉe Vieno. Ĉi tiu kongreso estis ankaŭ interesa.

Ĉu vi jam havis aliajn esperantistojn kiel gastojn? Samideanojn el aliaj landoj?

Jes, unufoje estis unu geedza paro ĉe mi, sed mi ne memoras plu pri iliaj nomoj. Ili estis nur tri tagojn en Vieno. Tre mallonge.

Kie okazis en pasinteco niaj renkontiĝoj?

Niaj samideanoj renkontiĝis pasintece ĉiam jaŭde, en unu kafejo en la Favoritenstr. 44 (afejo Frey).

Ĉu vi de tempo al tempo legas en Esperanto, aŭ ĉu vi renkontas aliajn esperantistojn?

Ne, bedaŭrinde ne. Ĝi endormiĝis tute. Sinjoro Vokal mortis kaj kvar jarojn post li mortis ankaŭ lia filino, kaj ili estis por mi la unusola konekto al Esperanto. Antaŭ du jaroj mortis unu esperantistino kaj sinjoro Amir alvokis min kaj demandis min, ĉu mi ankaŭ ŝatus kunveni al entombiĝo de tiu ĉi sinjorino. Mi surpriziĝis, kiam mi aŭdis pri ŝia morto. Ŝi naskiĝis en la jaro 1944 kaj mortis antaŭ du jaroj. [Temas pri Elisabeth Hlauschek, 17.12.1944 – 28.05.2018.]

Ĉu vi rememoras specialajn amikecojn el la Esperanto-movado?

Jes, mi havis unu amikon, kiu ŝatis lerni Esperanton kun mi, sed pri lia nomo mi bedaŭrinde ne plu memoras.

Por la fino de nia intervjuo, mi ŝatus demandi vin, kion donis Esperanto al vi?

Esperanto donis multe al mi. Mi neniam estus vidinta Aŭstralion sen Esperanto. 2020-11-05, Franziska Dodik



Deutscher Esperanto-Bund e.V.

Nils Brinkmann

24.10.2020

Protokoll der Bundesversammlung am 24.10.2020 in Osterode am Harz

Beginn der Bundesversammlung: 14.30 Uhr,
Ende 17.00 Uhr

Anwesende Stimmberechtigte: 30

Virtuell, aber ohne Stimmrecht nahmen 20
Personen teil.

Vom Vorstand waren anwesend:

Ulrich Brandenburg, Barbara Brandenburg, Michaela Stegmaier, Andreas Emmerich, Dr. Matthias Hecking, Andreas Diemel, Franz Kruse; Nils Brinkmann
Krankheitsbedingt entschuldigt: Wolfgang Bohr, Oliver Walz

1. Eröffnung

a) Begrüßung

Der Bundesvorsitzende Ulrich Brandenburg begrüßt die Anwesenden und eröffnet die Versammlung. Er weist darauf hin, dass aus rechtlichen Gründen die Versammlungssprache Deutsch sein muss.

b) Feststellung der Beschlussfähigkeit

Die Einladung zur Bundesversammlung vom 24.10.2020 wurde rechtzeitig mit der Verbandszeitschrift „Esperanto aktuell“ (Nr. 261, 3/2020) verschickt. Damit ist die Versammlung, unabhängig von der Anzahl der Anwesenden, beschlussfähig.

c) Genehmigung der Tagesordnung

Die Tagesordnung wurde einstimmig angenommen.

d) Wahl des Protokollführers

Auf Vorschlag von Ulrich Brandenburg wird Nils Brinkman einstimmig zum Protokollführer gewählt.

e) Genehmigung des Protokolls

der Bundesversammlung 2019 Neumünster

Das genannte Protokoll wurde in der Ausgabe 5/2019 von „Esperanto aktuell“ veröffentlicht. Es wird bei zwei Enthaltungen und 28 Ja-Stimmen genehmigt.

In einer Schweigeminute wird der Verstorbenen des letzten Jahres gedacht:

Erika Discher, Gert Heintze, Josef Schiffer, Albert Schubert, Norbert Merkens, Fritz Lautenbach, Peter Focke, Klaus-Peter Fritz, Siegfried Eichberger, Dr. Johannes Kasselmann, Elke Kern-Kühnel, Günter Merle, Ursula Felhöltter.

2. Berichte der Bundesorgane

a) Bericht des Vorstandes

Es wird auf den Vorstandsbericht (abgedruckt in „Esperanto aktuell“ Nr. 3/2020) durch den Vorsitzenden verwiesen. Ulrich Brandenburg gibt einen Überblick über die Vorstandarbeit seit der letzten Bundesversammlung in Neumünster. Die März-Vorstandssitzung musste coronabedingt abgesagt werden. Die Herbstsitzung konnte in Berlin stattfinden, Teile des Vorstands wurden hierbei per Video zugeschaltet. Der Rhythmus der 14-tägigen Telefonkonferenzen wurde beibehalten.

Der Vorsitzende dankt dem Team der Organisatoren des 36. PSI (Lutherstadt Wittenberg), das ebenfalls nicht stattfinden konnte. Es sei aber kein finanzieller Schaden entstanden.

Der Vorsitzende berichtet ferner über das Erasmus+-Programm und berichtet, dass Subventionen der Stiftung für Deutsch-Polnische Zusammenarbeit für den GEK 2021 aus 2020 übertragen werden können.

Der Vorsitzende weist darüber hinaus auf die Notwendigkeit verstärkter Mitgliederwerbung hin.

Andreas Emmerich berichtet über seine Tätigkeit als stellv. Vorsitzender. Er berichtet über die erneute Ausstellung einer dreijährigen Freistellungsbescheinigung für die Jahre 2017 bis 2019, die durch das Finanzamt Charlottenburg erteilt wurde.

Er weist nochmals auf die Möglichkeit, den DEB durch Erbschaften zu begünstigen. Auch die FAME-Stiftung, die sich der Förderung von Esperanto-Kultur verschrieben hat, könne berücksichtigt werden. Er sei gerne beratend tätig, um Komplikationen im Nachgang einer Erbschaft zu vermeiden.

Franz Kruse berichtet über seine Tätigkeit als IT- und Technikbeauftragter. In Bezug auf das Internet habe sich in letzter Zeit viel ergeben. So seien der Internetauftritt esperanto.de neu strukturiert worden, sodass Informationen leichter aufzufinden sind. Überdies seien alle „Esperanto aktuell“-Ausgaben seit 2011 elektronisch archiviert worden. Einige Ortsgruppen können das Content-Management von GEA nutzen. Franz Kruse gibt gerne Hilfestellungen.

Es habe sich überdies eine neue Arbeitsgruppe gebildet, die sich um die Befüllung der sozialen Netzwerke kümmern

will. Einige Kanäle werden bereits gut genutzt und mit Informationen versorgt. Helpo@esperanto.de wurde eingerichtet, um bei technischen Fragen Hilfestellungen zu leisten.

Barbara Brandenburg (Verwaltung) berichtet darüber, dass es neuerdings vier ehrenamtliche Mitarbeiterinnen gibt, die bei der Katalogisierung von Buchbeständen mithelfen. Sie appelliert an die Mitglieder, verstärkt ausschließlich Online-Anmeldungen zu nutzen.

Andreas Diemel (Veranstaltungen) berichtet über das noch zum Jahreswechsel 2019/2020 stattgefundene Treffen LUMINESK, das erfolgreich verlaufen sei. Das LUMINESK 2020/21 soll in Münster stattfinden. Die Vorbereitungen laufen ungeachtet der Corona-Krise weiter. Ulrich Brandenburg berichtet über die Herbstwanderung im Wendland, an der – trotz Corona – 15 Personen teilgenommen haben.

Michaela Stegmaier (DEJ) berichtet, dass Veranstaltungen der Esperanto-Jugend derzeit primär online stattfinden müssten. Auch sei es gelungen, über Online-Seminare Interessenten für einen künftigen Vorstand zu gewinnen. Lu von Wunsch-Rolshoven erläutert die unter Punkt 7.6 („Presse- und Öffentlichkeitsarbeit“) gemachten Ausführungen im Vorstandsbericht, in denen es primär darum geht, Vorurteile und Falschbehauptungen durch Sprachwissenschaftler und Journalisten zu entkräften bzw. aufzuklären.

2 b) Bericht des Schatzmeisters

Dr. Matthias Hecking erläutert seinen Kassenbericht, der unter dem Titel: „Auch der Jahresabschluss 2019 zeigt ein positives Ergebnis“ in „Esperanto aktuell“ Nr. 2/2020, ab S. 9) abgedruckt ist. Wie dort dargelegt, zeigt auch der Jahresabschluss 2019 ein positives Ergebnis. Die Budget-Ansätze wurden eingehalten bzw. übertroffen. Alle Veranstaltungen haben positiv abgeschlossen. Als zusätzliche Einnahmequelle konnte eine EU-Förderung aus dem Programm „Erasmus+“ erschlossen werden.

Der Vorstand bittet die Mitglieder um Spenden zur Aufstockung des GEA-Kapitals gem. § 62 Abs. 3 Nr. 3 AO.

Dr. Hecking bittet die Mitglieder ferner, Änderungen bei der Bankverbindung zeitnah mitzuteilen. Auszahlungen an Einzelpersonen oder Ortsgruppen gebe es nur gegen Belege; auch sei ein gewisser zeitlicher Vorlauf zur Begleichung erforderlich.

2 c) Bericht des Rechnungsprüfers

Kassenprüfer Uli Ender berichtet über die Kassenprüfung, die am 07.03.2020 (Zitat siehe „Esperanto aktuell“, Nr. 2/2020, Seite 13) stattfand. Die Kassenprüfer Uli Ender und Reinhard Pflüger empfehlen die Entlastung des Vorstands für das Jahr 2019 und danken dem Schatzmeister für seine Arbeit.

3. Entlastung des Vorstands

Der Kassenprüfer Uli Ender beantragt, den Vorstand zu entlasten. Bei acht Enthaltungen (der acht Vorstandsmitglieder) wird der Vorstand entlastet.

4. Wahl eines von zwei Rechnungsprüfern

Reinhard Pflüger hat zwei Amtsperioden hinter sich und kann deshalb nicht wieder kandidieren. Stefan Krieghoff ist bereit zu kandidieren. Bei zwei Enthaltungen wird Herr Krieghoff zum Rechnungsprüfer gewählt. Dieser nimmt die Wahl an.

5. Haushaltsplan 2021

Dr. Hecking erläutert die Mitgliederstruktur von DEJ und DEB und den Haushaltsplan für 2021 (s. „Esperanto aktuell“, Nr. 1/2020, Seite 7). Die Mitgliederzahl ist bis jetzt im Jahr 2020 konstant geblieben. Die bisherigen Austritte und Todesfälle konnten durch Neueintritte kompensiert werden. Bis Ende des Jahres ist aber mit einem Absinken der Mitgliederzahl zu rechnen. Dr. Hecking erläutert die Einnahmesituation aufgrund der sinkenden Mitgliedszahlen. Da nicht alle Mitglieder ihren Zahlungsverpflichtungen nachkommen, erschwert sich die Prognose von Einnahmen.

Gegenüber der abgedruckten Fassung macht Dr. Hecking auf eine notwendige Ergänzung aufmerksam. Die letzte Zeile mit dem Vereinsergebnis wurde nicht abgedruckt. Das geplante Vereinsergebnis ist ein Liquiditätsverlust in Höhe von 8.723 Euro. Ausgeglichen sei der Haushaltsplan nur, wenn wieder im ausreichenden Maße gespendet werde.

Beschluss über den Haushaltsplan 2021:

Bei einer Enthaltung wird der Haushaltsplan 2021 angenommen.

6. Behandlung von Anträgen

Anträge liegen nicht vor.

7. Ort und Zeit der nächsten Bundesversammlung

Der Antrag des Vorsitzenden, die nächste Bundesversammlung im Rahmen des nächsten Deutschen Esperanto-Kongresses in Frankfurt/O./Słubice am 23.05.2021 (Pfingstsonntag) abzuhalten, wird bei einer Enthaltung angenommen.

8. Verschiedenes

Lu von Wunsch-Rolshoven berichtet über ein neu erscheinendes Buch über Plansprachen „Die Bienen und das Unsichtbare“ von Clemens Setz, in dem positiv über Esperanto geschrieben wird. Peter Kühnel wirbt für Esperanto-Veranstaltungen in Grésillon. Peter Zilvar weist auf eine Autorenlesung in Osterode Anfang November hin („Language As Hope“ von Prof. Feierstein), das Buch hebt ebenfalls Esperanto positiv hervor. Ferner mögen verstärkt Anstrengungen im Bereich der Podcasts und Youtube unternommen werden. Hierfür stünden auch Mittel bereit, die allerdings auch abgerufen werden müssen.

Die Teilnehmerinnen und Teilnehmer der Bundesversammlung als auch der Zoom-Konferenz stimmen der Verwendung ihrer Bilder zu Dokumentationszwecken zu.

Der Vorsitzende schließt die Sitzung am 24.10.2020 um 17.00 Uhr.

gez.

Nils Brinkmann
(Protokollführung)

gez.

Ulrich Brandenburg
(Bundesvorsitzender)



Gefördert durch die
**DEUTSCHE STIFTUNG
FÜR ENGAGEMENT
UND EHRENAMT**

Dieses Zeichen werden Sie demnächst öfter sehen – besonders dann, wenn wir im Deutschen Esperanto-Bund Online-Veranstaltungen durchführen.

Warum? Wir haben von der seit Juni 2020 bestehenden Stiftung für Engagement und Ehrenamt eine Förderung für die Schaffung digitaler Infrastruktur in Vereinen bekommen.

Auf ihrer Internetseite schreibt die Stiftung: „Durch die Corona-Pandemie waren und sind wir vor besondere Herausforderungen gestellt. Um gemeinnützige Organisationen, Engagement und Ehrenamt in dieser schwierigen Zeit zu unterstützen, hat die Deutsche Stiftung für Engagement und Ehrenamt das „Förderprogramm Gemeinsam wirken in Zeiten von Corona“ aufgelegt.“

Durch die gute Vernetzung mit dem Portal für Ehrenamtlichkeit hier in Berlin erfuhren wir Mitte September von diesem Förderprojekt. Anträge sollten so bald wie möglich, aber spätestens bis zum 31. Oktober eingereicht werden. Wir stellten einen Antrag auf „Technische Ausstattung für Internet-Übertragungen und

Videokonferenzen“ und reichten diesen bereits Anfang Oktober ein. Er wurde am 29. Oktober bewilligt und versetzt uns jetzt in die Lage, eine Lautsprecheranlage, eine hochwertige Videokamera, ein passendes Notebook und einen gut transportierbaren Tageslicht-Beamer kaufen zu können.

Wir bedanken uns herzlich!

Barbara Brandenburg

Retaj kunvenoj por ĉiuj

**Kiel kromefiko de la koronvirusa pandemio
retaj kunvenoj fariĝis popularaj.**

Ili malfermas tute novajn perspektivojn: komforte partopreni renkontiĝojn ie ajn en la mondo, sen forlasi la propran hejmon. Nun ankaŭ Germana Esperanto-Asocio disponas pri propra Zoom-konto. Zoom estas sistemo, kiu ebligas retajn kunvenojn kun – en nia kazo – ĝis 100 partoprenantoj kaj sen tempa limigo.

Ni senpage disponigas tiun sistemon (kaj la teknikan subtenon) ankaŭ al niaj landaj ligoj, lokaj grupoj kaj renkontiĝoj, por ke ili povu facile aranĝi proprajn retajn kunvenojn. Nia teknika kunordiganto estas Heinz Sprick el Hameln. Li helpas al vi instaligi vian propran Zoom-kanalon.

Kontakto: gea.zoom@esperanto.de,
tel. 0800-3363636-5128

